



S-ro RAFAELO DUYOS

Kapitano de Infanterio—Vocdonanto de la  
Direkta Komitato de H. S. p. p. E. kaj  
Sekretario de la Grupo Esperantista de Valencia

# LA SUNO HISPANA \*

---

**ENHAVO:** 1. Kondolenco.—2. Sciigoj.—3. Bibliografio.—4. Blinda Advokato.—5. Kuriozaĵoj por la cigarfumantoj.—6. La bonfarinta gardenisto.—7. Miksaĵoj.—8. Korespondada fako.—9. Niaj vizitantoj.—10. Anoncoj.

---

## Kondolenco

La morto, la nelaciĝebla morto, forrabis respektindan kaj virtan viron, sinjoron Jaime Bosch!

Neripareblan perdon ploras nun nia prezidanto S-ro Ricardo Codorniu; la patro de lia edzino ankaŭ estis por li vera kaj amega patro, kaj tial la neevitebla disiĝo estis pli kruela.

Ne ĉiam per vortoj oni povas esprimi la animajn sentojn, sed devigataj pro la foresto konfidi al vortoj ĉion, kion kaŝas nia koro, ni, hodiaŭ publike, kiel hieraŭ private, kondolencas kun Gesinjoroj Codorniu, okaze la bedaŭrinda perdo de tiel nobla viro.

La senĉesa kunlaborado por ebenigi la vojon al nia celo unuigas nin por ĉio; ĝojoj kaj funebroĵoj ne povas frapi nur iun el nia rando; ili frapas ĉiujn kune.

Resignacion!!

## Sciigoj

**Anglujo.**—Firmo «Stephens Inks» disdonas al ĉiuj esperantistoj inksorbilojn kun esperantaj anoncoj kaj sciigoj pri siaj diversaj fabrikoj. Bela katalogo ankaŭ esperante redaktita prezentas la prezojn vere malaltajn de ĉiuj komercaĵoj akireblaj el tiu sama konata firmo.

La paketo de inksorbiloj kaj anoncoj enhavas leteron de D-ro Zamenhof; per ĝi petas nia Majstro al ĉiu esperantisto kelkajn sciigojn por la aranĝo de tute ĝusta adresaro de esperantistoj.

Tiuj el niaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis la Stephens'an paketon, bonvolu peti ĝin per esperanta poŝtkarto kun nomo kaj adreso legeble skribitaj, al sinjoro H. C. Stephens, 57-59, Aldersgate street, London, E. C. kaj poste plenumi la deziron de D-ro Zamenhof.

Ĝis nun firmo Stephens disdonis 25.000 paketojn. Por tio certe ĝi faris grandajn elspezojn, kaj kvankam espereble ĝi ne perdos tiun monon, ni, la esperantistoj dankas ĝin pro la helpo donita al nia afero.

Fondiĝis grupoj en Burnley kaj en Batley, kaj klubo esperantista en Cardiff.

**Franco.**—S-ro Th. Cart faris plenan kurson de Esperanto en la Politeknika Lernejo, en Parizo.

Grupoj fondiĝis en Lens, Dunkerque kaj Donai, kaj aperis en la franca ĵurnalaro multego da bonegaj artikoloj pri Esperanto.

Lundon 23<sup>a</sup> de Julio, leŭtenanto Bayol, instruisto ĉe la speciala militista lernejo de St. Cyr, faris al la militlernantoj paroladon pri «Esperanto kaj ĝiaj aplikadoj dum militiro». Antaŭ la parolado

**Inglaterra.**—La casa «Stephens Inks» distribuye entre todos los esperantistas secantes con anuncios en esperanto y noticias sobre sus diversos productos. Un bonito catálogo, también escrito en Esperanto, presenta los precios verdaderamente económicos de todos los objetos que pueden adquirirse en tan famosa casa.

El paquete de secantes y anuncios contiene una carta del Dr. Zamenhof; por ella pide nuestro Maestro a cada esperantista algunas noticias para el arreglo de un «adresaro» de esperantistas totalmente exacto.

Aquellos de nuestros lectores que aun no hayan recibido el paquete de Stephens, pídalo por postal en Esperanto con el nombre y dirección escritos con claridad al Sr. H. C. Stephens, 57-59, Aldersgate street, London, E. C., y cumplán luego el deseo del Dr. Zamenhof.

Hasta ahora la casa Stephens ha distribuido 25.000 paquetes. Grandes gastos hizo ciertamente para esto, y aunque es de esperar que no perderá ese dinero, nosotros los esperantistas le damos las gracias por la ayuda dada a nuestro asunto.

Se han fundado grupos en Burnley y en Batley y un Club esperantista en Cardiff.

**Francia.**—Sr. Th. Cart ha dado un curso completo de Esperanto en la Escuela Politécnica de París.

Se han fundado grupos en Lens, Dunkerque y Donai, y en la prensa francesa se han publicado muchos excelentes artículos sobre el Esperanto.

El lunes 23 de Julio, el teniente Bayol, profesor de la escuela especial militar de Saint Cyr, dió una conferencia a los alumnos sobre «El Esperanto y sus aplicaciones en campaña.» Antes de la conferencia



generalo Marcot instigis la oficirojn al Esperanto.

Ĉe alia militista lernejo Politeknika ekzistas esperantista grupo organizita de la militlernantoj.

Multe da francaj oficiroj kaj generaloj estas esperantistoj; nun ni memoras generalojn Bailloud de la XX<sup>a</sup> Korpuso, Girardel de la XIII<sup>a</sup>, Gillet de la 3<sup>a</sup> divizio kaj Debatisse de la II<sup>a</sup> Korpuso; tiu ĉi lasta akompanis nian reĝon Alfonson dum lia vizito al Francujo.

Du gravaj esperantistaj societoj fondiĝis en Parizo: *Sekcio industria kaj komerca de la esperantista grupo Pariza* kaj *Tutmonda labora Societo*.

La unua prenas sur sin la taskon transdoni ĉiun komunikaĵon esperantan al personoj eĉ ne esperantistaj el la komercistaro de Parizo kaj ĉirkaŭurbo.

La dua precipe celas unuigi la esperantistojn gesalajrulojn por plifaciligi la rilalojn inter geoficistoj kaj gelaboristoj el simila ofico aŭ okupado, kaj havigi oficon aŭ laboron al la senlaboraj anoj.

**Belgiujo.**—La Ministro de Publika Instruado petis al nia fervora samideano komandanto Lemaire, raporton pri la formebleco de profesoroj de Esperanto.

**Aliaj landoj.**—S-ro Duyos pretigis artikoleon pri la progresoj faritaj de Esperanto en la tuta mondo dum la unua duonjaro ĵus pasinta, sed ni prokrastas ĝian publikigon ĝis la venonta monato kiam por la Kongreso Geneva niaj plej fervoraj samideanoj ferojaĝos en Svisujon kaj malmultaj sciigoj estos raportotaj.

Tamen ni sciigas plezurege al nia legantaro, ke Esperanto multe progresas en Japanujo kaj oni malfermis novan kurson en Okayama kun 433 lernantoj, el kiuj 350 estas japanoj.

Ankaŭ fondiĝis grupon en Melbourne (Aŭstralio) kaj baldaŭ fondiĝos alia en Christchurch (Nova Zelandio).

el generalo Marcot alentó á los oficiales al estudio del Esperanto.

En otra escuela militar Politécnica existe un grupo esperantista organizado por los alumnos.

Muchos oficiales y generales franceses son esperantistas; recordamos ahora á los generales Bailloud, del XX<sup>o</sup> Cuerpo; Girardel, del XIII.<sup>o</sup>; Gillet, de la 3.<sup>a</sup> División, y Debatisse, del II.<sup>o</sup> Cuerpo; este último acompañó á nuestro rey Alfonso durante su visita á Francia.

Dos importantes sociedades esperantistas se han fundado en París: *Sección industrial y comercial del grupo esperantista de París* y *Sociedad universal de trabajo*.

La primera toma sobre sí el trabajo de trasladar toda comunicación en Esperanto á personas no esperantistas del comercio de París y arrabales.

La segunda tiende principalmente á unir á los jornaleros esperantistas para facilitar las relaciones entre empleados y trabajadores de oficio ú ocupación semejante y proporcionar destino ó trabajo á los socios sin trabajo.

**Belgíca.**—El Ministro de Instrucción Pública pidió á nuestro celoso correligionario Comandante Lemaire una Memoria sobre la posibilidad de formar un profesorado esperantista.

**Otros países.**—El Sr. Duyos preparó un artículo sobre los progresos hechos por el Esperanto en el pasado semestre; pero retrasamos su publicación hasta el mes que viene, cuando por el Congreso de Ginebra nuestros más fervientes correligionarios marcharán á Suiza y habrá pocas noticias que publicar.

Sin embargo, comunicamos con gusto á nuestros lectores que el Esperanto progresa mucho en el Japón y que se ha abierto un nuevo curso en Okayama con 433 alumnos, de los cuales 350 son japoneses.

También se han fundado grupos en Melbourne (Australia) y pronto se fundará otro en Christchurch (Nueva Zelandia).



**Hispanujo.** — La somera libertempo eble haltigos iom nian propagandon; la fortaj *varmoj*, malgraŭ la fizikaj reguloj, *malvarmigas* kelkajn samideanojn kaj ankaŭ ni ĉiujn atendas la sukceson de la nova Kongreso por havi novajn fortojn kaj pruvojn helpontajn al la batalado. Multaj forlasas sian loĝejon serĉante someran sestejon kaj la grupoj disiĝas...

Sed kien ajn vi iros, tie vi trovos esperantigotan iun, tie vi trovos kulturigeblian kampon, sekve vi devas labori. Via laboro estos pli facila ĉar viaj amikoj senigitaj de la ĉiutagaj okupadoj, trovos en la lernado de Esperanto, amuzon, kiu estos tutkore akceptata por fari pli agrabila la trankvilan someran vivadon.

Jen ni havas bonan ekzemplon.

Kelkaj valenciaj amikoj, kiuj somerrestas en la proksima vilaĝeto Rokafort'o, utiligas sian libertempon por lerni kaj disvastigi Esperanton. Lernejon ili ne bezonas, ĉar ili kunsidas sub la branĉoj de ombriga arbo, kie la ĉiutaga lekciono estas klarigata de la plej bonega lernanto. Laŭdebla estas ilia deziro kaj ni esperas ke baldaŭ niaj amikoj fariĝos lertegaj esperantistoj, kaj vintre vastigos la Valencian Grupon.

Ni deziras ke ili havu multajn imitantojn.

La Organiza Komitato de la Pedagogia Konkurso de Santiago, laŭ peto de niaj tieaj samideanoj, akceptis temon pri Esperanto, kies premio, donacata de Hispana Societo, konsistis el kelkaj bonegaj esperantistaj verkoj. Speciala juĝantaro estis nomata por tiu temo, kaj niaj amikoj S-roj Ayza, Duyos kaj Jiménez Loira plenumis plej senpartie kiel eble tiun honoran taskon.

El la verkoj senditaj ricevis la premion tiu titolita «Nuna kaj estonta stato de Esperanto», sed la juĝantaro ankaŭ citis en sia decido kiel laŭdindajn verkojn, tiujn, kies lemoj estis «Donacu vi benon al nia laboro, donacu vi forton al nia fervoro», «La pereza intelektual es el mayor obstáculo á la propagación del

**España.** — Las vacaciones veraniegas detendrán probablemente un poco nuestra propaganda; los fuertes *calores*, á pesar de las leyes físicas, *enfriarán* á algunos *samideanos*, y todos esperamos también el éxito del nuevo Congreso para tener nuevas fuerzas y pruebas que han de ayudar en el combate. Muchos abandonan su residencia buscando puntos de verano y los grupos se deshacen...

Pero dondequiera que vayáis, allí encontraréis á alguien por esperantizar, allí encontraréis campo cultivable; por consiguiente debéis trabajar. Vuestro trabajo será más fácil, porque vuestros amigos, despojados de las cotidianas tareas, encontrarán en el estudio del Esperanto una distracción que será cordialmente aceptada para hacer más agradable la tranquila vida de verano.

Aquí tenemos un buen ejemplo:

Algunos amigos valencianos que veranean en el cercano pueblecillo de Rokafort utilizan sus vacaciones para aprender y difundir el Esperanto. Escuela no necesitan, porque se reúnen bajo las ramas de umbroso árbol donde la lección diaria es explicada por el mejor estudiante. Laudable es su deseo, y esperamos que pronto nuestros amigos serán excelentes esperantistas y engrosarán durante el invierno el grupo de Valencia.

Deseamos que tengan muchos imitadores.

El Comité organizador del Certamen Pedagógico de Santiago, á petición de nuestros compañeros de allí, aceptó un tema sobre Esperanto, cuyo premio, regalado por la Sociedad Española, se componía de algunas buenas obras esperantistas. Un jurado especial fué nombrado para este tema, y nuestros amigos señores Ayza, Duyos y Jiménez Loira cumplieron imparcialmente tan honrosa tarea.

De las obras enviadas mereció el premio la titulada «El Esperanto en la actualidad y en el porvenir», pero el jurado citó también en su fallo, como laudables obras, aquellas cuyos lemas eran: «Donacu vi benon al nia laboro, donacu vi forton al nia fervoro», «La pereza intelectual es el mayor obstáculo á la propa-



Esperanto» kaj «Por Dio kaj la homaro».

Ni gratulas la Organizan Komitaton de tiu Pedagogia Konkurso pro la kora akcepto de la esperanta temo, kaj ankaŭ ni sendas niajn gratulojn al la aŭtoroj de la supre nomitaj verkoj, kies nomoj ni ankoraŭ ne konas, ĉar la presada laboro devigas nin sendi tiujn ĉi liniojn tre frue al la kompostistoj; sed ni publikigos ilin en la venonta numero.

Ni ĵus ricevis post la presado de la antaŭa paragrafo la nomojn de la personoj premiitaj:

La premio oferdonita de la H. S. p. p. E. por la plej bona verko pri Esperanto, estas liberita de la komisio al la verko de S-ro Emanuelo Monteagudo, el Korunja. Proksimaĵoj, al sinjorino María Barbeito, profesorino el Korunja, al S-ro Santiago Carro García, el Santiago, kaj al S-ro Andreo Bravo del Barrio, el Madrid. Nian plej sinceran gratulaĵon al la diritaj personoj.

Kaŭze de la libertempo multaj el niaj korespondantoj serĉis pli malvarmetan restejon kaj tial ne povis sendi al tiu ĉi redakcio plenan nomaron de la artikoloj publikigitaj en hispanaj jurnalaj pritraktantaj Esperanton. Ni tamen citas tiujn publikigitajn de S-ro Codorniu en la murciaj jurnalaj kaj ni preparolos la aliajn en la venonta numero.

En Sabadell fondiĝis «Akademio esperantista», kies direktanta komitato estas:

Honoraj Prezidantoj: D-ro L. Zamenhof kaj S-ro Marko Liró,<sup>6</sup> skolapiulo.—Prezidanto, S-ro Félix Sotorra, doktoro de medicino kal nirurgio.—Viceprezidanto, S-ro Josefo Facher, pastro, licenciato de leĝoscienco, filozofio kaj literaturo.—Kasisto, S-ro Miguel Fonolleda, medicina studento.—Sekretario, S-ro Johano V. Lladó, advokato kaj sekretario de la sabadell'a juĝoficejo.—Bibliotekisto, S-ro Josefo Manáu, advokato.—Voĉdonantoj, S-roj Pascual, doktoro de leĝoscienco; Pablo M. Llobet, komercisto, kaj Ramono Masats, direktoro de la sabadella revuo «Agricultura».

gación del Esperanto» y «Por Dio kaj la homaro.»

Felicítamos al Comité organizador de ese certamen pedagógico por la cordial aceptación del tema de Esperanto, y enviamos asimismo nuestras felicitaciones á los autores de las obras citadas, cuyos nombres todavía no conocemos, porque el trabajo de imprenta nos obliga á enviar con antelación estas líneas á los cajistas, pero los publicaremos en el número próximo.

Acabamos de recibir, después de impreso el párrafo anterior, los nombres de las personas premiadas.

El premio ofrecido por la H. S. p. p. E. al mejor trabajo sobre el Esperanto ha sido adjudicado por la Comisión á la composición de D. Manuel Monteagudo de Coruña. Accésits á D.<sup>a</sup> María Barbeito de Coruña, á D. Santiago Carro García de Santiago y á Don Andrés Bravo del Barrio. Nuestra más sincera enhorabuena á las citadas personas.

A causa de las vacaciones, muchos de nuestros corresponsales buscaron su residencia veraniega y no pudieron enviar á esta redacción lista completa de los artículos publicados en la prensa española relativos al Esperanto. Sin embargo, citamos los publicados por el Sr. Codorniu en los periódicos de Murcia y en el próximo número hablaremos de los demás.

En Sabadell se ha fundado la «Academia esperantista», cuya junta directiva es:

Presidentes honorarios: Dr. L. Zamenhof y D. Marcos Liró, escolapio.—Presidente, D. Félix Sotorra, doctor en medicina y cirugía.—Vicepresidente, D. José Facher, presbítero, licenciado en Derecho, Filosofía y Letras.—Depositario, D. Miguel Fonolleda, estudiante de Medicina.—Secretario, D. Juan V. Lladó, abogado y secretario del juzgado de Sabadell.—Bibliotecario, D. José Manáu, abogado.—Vocales, Sres Pascual, doctor en Derecho; Pablo M. Llobet, comerciante, y Ramón Masats, director de la revista de Sabadell, «Agricultura».



Oni devas gratuliĝi la tuta esperantistaro, ĉar estis elektita en Romo Generala Preposito de la Skolapiuloj la R. P. Emanuelo Sanchez, kiu estas unu el la unuaj kiuj en Valencia konis kaj protektis entuziasme nian aferon. Ni tutkore gratulas lin kaj nin mem, kaj deziras al li multajn kaj grandajn feliĉaĵojn en lia tiel altega kiel delikata rolo.

Laŭ ni legis en la ĵurnalo *La Gaceta de Galicia* la 26<sup>a</sup> de Julio lasta okazis en Santiago de Compostela grandega festa kunveno organizita de la tieaj esperantistoj. S-ro Salvador Padilla, direktoro de la oficiala Gimnasio de Orense faris plenan paroladon pri Esperanto, kiu multege plaĉis al la tuta aŭdantaro kunmetita en sia plej granda parto el sinjorinoj kaj fraŭlinoj. Ankaŭ poste parolis pri sama temo S-ro Santaló, prezidanto de la Grupo. Ni tutkore gratulas kaj dankas la elparolintajn kaj la esperantistojn de Santiago.

El esperantismo estis de enhorabuena, pues ha sido elegido en Roma para Preposito General de los Escolapios el Reverendísimo P. Manuel Sánchez, uno de los primeros que en Valencia conocieron y protegieron con entusiasmo nuestra causa. De todo corazón le felicitamos y nos felicitamos, y le deseamos muchas y grandes prosperidades en su tan elevado como delicado cargo.

Según leímos en el diario *La Gaceta de Galicia*, el 26 de Julio pasado tuvo lugar en Santiago de Compostela una magnífica velada organizada por los esperantistas de allí. El Sr. D. Salvador Padilla, Director del Instituto de Orense, pronunció un discurso acabado sobre el Esperanto que agradó muchísimo á todo el auditorio, compuesto en su mayoría de señoras y señoritas. También después habló sobre el mismo tema el Sr. Santaló, Presidente del Grupo. De todo corazón felicitamos y damos las gracias á los oradores y á los esperantistas de Santiago.

## Bibliografio

*Un'ora d'Esperanto*, konferenco en forma de dialogo publikata da J. Meazzini (Arezzo, Italujo). Prezo: 0,50, ĉe la aŭtoro.

Tiu ĉi bela eldonita broŝureto estas bonega traduko de la franca verko de sinjoro Cart, *Une heure d'Esperanto*, kiun jam konas niaj legantoj. Ĝi certe helpas al la disvastigo de Esperanto en Italujo kaj montras la fervorecon por nia afero, de sinjoro Mazzini, kiu ankaŭ prenis nur sin la redaktadon de la *Vortaro itala-esperanta*, baldaŭ aperonta. Sendube *Une heure d'Esperanto* ĝuos ankaŭ la saman feliĉon, kiun sorto difinis al la verkoj de S-ro Cart, (t. e. esti tradukitaj en diversaj lingvoj), ĉar laŭ nia sciigo, ĝi baldaŭ aperos en hispana lingvo. Komprenibile, tion ja tro meritas tiun ĉi propaganda teatraĵo.

*Julio Cezaro*, tragedio en kvin aktoj de W. Shakespeare, tradukita de D. H. Lambert, B. A. (Oxon). Eldono de la Brita Esperantista Asocio (13, Arundel St., Strand. W. C.). Prezo 2 fr.

Jen ankoraŭ nova esperanta traduko de Ŝekspira tragedio? Nia literaturo estas en plena senhalta disvolviĝo. La lastan monaton ni raportis pri la Bajron'a verko *Ĉielo kaj Tero*, kaj hodiaŭ ni devas sciigi pri *Julio Cezaro*. Komprenibile ĉar la argumento estas jam sufiĉe konata, ni nur parolos pri la esperantigo de la verko. La traduko

estas tre lerte farita per senrimaj versoj: la stilo estas klara, simpla kaj korekta, malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj, kiujn oni trovas ĉiam ĉe versa traduko: la aŭtoro celis esperantigon laŭvortan kaj internacian, tiamaniere, ke la esperanta teksto estu klarigilo por tiuj, kiuj ne bone komprenas kelkajn frazojn de la originala versaĵo. Ni povas gratuli S-ron Lambert, ĉar la afero al li prosperis, kaj rekomendi la verkon al ĉiuj esperantistoj, en la certeco, ke ili ne pentos esti tralegintaj *Julien Cezaron*.

*Kelkaj floroj esperantaj* agrablaj legajoj kun multaj ilustraĵoj de a.-S. Witteryck. (Serio I, numero II). Prezoj por unu numero: en eksterbelgaj landoj, 0'25 fr.; por kvin numeroj, 1 fr.

La libreto estas kolekto da spositajoj, kiujn oni legas tre plezure. Ni konsilas ĝin al tiuj niaj legantoj, kiuj ial estas malbonhumoraj, ili certe ridos kaj ĝojos legante tiun interesan verketon de Sro. Witteryck.

*Lernolibro de esperanta stenografio (unuiga sistemo Stolze-Schrey)* verkis Pastro. Frederiko Schorzeberger. Eldono de *Esperanto verlag Moller de Borel*. Berlino S 52. Prezo: 0'80 markoj.

Kiel tre saĝe diras la aŭtoro en antaŭparolo: «ju pli disvastiĝas la lingvo internacia «Esperanto», des pli ĝi bezonas simplan mallongan skribon por la sciencaj kaj komecaj interrilatoj; kun la stenografio estas eble mallongigi la skriban laboradon ĝis unu »kvaronon aŭ sesonon» tempo estas mono! Bezono do ŝpari monon, ŝparante tempon, »estas pli malpli ĉiuhoma» Tial li celis presenti al ni sistemon, por kiu oni sukcesas skribi tre rapide niam lingvon internacian kvankam jam diversaj stenografiaj sistemoj estas alfaritaj por Esperanto, kaj tute ne deprenante de la legantoj la liberecon, ke ili elektu tiun, kiu al ili ŝajnos plej bona kaj facila, ni rekomendas al ĉiuj samideanoj la novan verkon de la fervorega propagandisto, unue ĉar la libro apartenas al «kolekto aprobita», kio tre alte parolas pri ĝiaj ŝatindaj meritoj, kaj due, ĉar S-ro Schneeberger uzis sian sistemon stenografian «Esperanto» dum la lasta Bonlogne'a kongreso, kie li tie sukcese transkribis la paroladojn de ĉiuj, kiuj partoprenis en la kunsidoj.

*Dektriopo* unuakta salona komedio tradukita de grafo Albert Sallois. Prezo: 0'70 (afrankite), ĉe la tradukinto en *Rivolunato* (provinco de Modena). Italujo.

Nia senlaca batalanto en la belega itala lando, prezentas al ni tre purstilan tradukon de sprita salona komedio, ĉio estas en la verketo delikata, bongusta, kaj ĉarma. Legu niaj legantoj *Dektriopo* kaj ili konvinkiĝos ankoraŭ unu fojon pri la ŝatindaj tradukaj eroj de Esperanto.

*Verkaro de V. N. Devjatnin* (rusa esperantisto), libro unua. Librejo Hachette kaj K.° Parizo. Prezo: 2 fr.

S-ro Devjatnin apartenas al tiu meritoplena aro da rusaj Esperantistoj, kiuj distingiĝas per majstra posedo de Esperanto en verkado kaj tradukado de literaturaj tekstoj. Tio ĉi sufiĉas, por ke niaj legantoj tuj komprenu, ke ni aludas S-rojn Grabwski, Leo Belmont, Kofman, Kabe, Lojko, Gernet, Kazy, Girej... Ili aliĝis al nia afero en la unuaj jaroj post la elpenso de Esperanto, kaj fervore bataladis por la propagando de la lingvo internacia, en tiu tempo, kiam Esperantistoj ĉie ricevis senescepte nur mokojn kaj malakceptojn. Tiam li verkis kaj tradukis multajn literaturajn tekstojn, kiuj enpresigis en «Esperantisto» aŭ aparte publikigis en la Kajeroj de la *Biblioteko*, kiun eldonis D-ro Zamenhof. Nun li havis la bonan ideon kune publikigi ĉiujn siajn esperantajn verkojn, en *kolekto aprobita* de firmo Hachette, kio



donos al multaj novaj esperantistoj la eblon, konatiĝi kun tiuj belaj tekstoj antaŭlonge verkitaj. La unua libro de «Verkaro de V. N. Devjatnin», enhavas kelkajn apartajn versaĵojn kaj la verkojn: «Nevola mortiginto» (rakonto), «Boris Godunov» (dramon de A. Puŝkin) kaj «Demono» (orienta rakonto el Lemontov).

La libro havos tre grandan sukceson kaj ĉar la franca firmo Hachette jam eldonis «Kondukanto de la internacia parolado kaj antologio» de S-ro Grabowski kaj «Pola Antologio» de S-ro Kabe, ĉu ĝi ne farus grandan servon al nia afero, publikigante ankaŭ la verkojn de la aliaj ĵus nomitaj rusaj esperantistoj, speciale tiun de S-ro Kofman, kiu dum multaj jaroj sin donis al pliriĉigo de la esperanta literaturo? Sendube tiuj kolektoj da belaj verkoj estus tre favore akceptitaj de ĉiuj esperantistoj, kiuj nun bedaŭras ne povi konatiĝi kun ili, ĉar la plejmulte el la verkoj de S-ro Kofman, Gernet, k. c., enpresigis en «Esperantisto» kaj aliaj gazetoj aŭ broŝuroj kiuj nun jam estas neaĉeteblaj.

V. INGLADA.

*La Tutmonda Ĵarlibro Esperantista por 1906* ĵus aperis. Ĝi enhavas pli ol 30.000 nomojn kaj adresojn de Esperantistoj kaj konsistas el 506 paĝoj dense presitaj. Ni atentigas niajn legantojn pri la granda utileco de tiu propagandilo por la lingvo Esperanto, ĉar ĝi ebligas, ke la Esperantistoj facile interkonatiĝu, kaj ankaŭ ĝi montras la potencan disvastiĝon de Esperanto tra la mondo, Poŝtkarto estas enmetita en la nova eldono; kaj dank' al ĉi tiu poŝtkarto oni povas sendi al la redakcio novajn aliĝojn aŭ ŝanĝojn de adreso. k. t. p. La kosto estas fr. 3,50. Sin turni al la firmo Hachette kaj K<sup>o</sup>, 79, boulevard Saint-Germain, Paris (France) aŭ al ĝiaj riprezentantoj, ekster Francujo.



## Blinda Advokato

En la pedagogia historio de Aŭstralio la plej rimarkinda okazo estas tiu de la edukado de blinda junulo de Christchurca, kiu ĵus finis en Sidney, siajn universitatajn studojn.

Kiel bone diras Sidneya ĵurnalo, la malhelpaĝoj naturaj estis jam sufiĉe gravaj, sed la postulaĵoj de la administrantaro treege pligrandigis ilin, ĉar videble oni faris multe malpli ol tio, kion ni povis esperi por helpi al S-ro Mac William.

Komence, oni diris al li ke estas tute neeble ke li sin prezentu por la unua ekzameno. Tamen li ne malkuraĝiĝis, kaj fine oni konsentis ke li konkuru diktante al skribisto siajn respondojn al la demandoj al li legotaj. Li daŭrigis la saman farmanieron ĝis la fino de sia unua jaro de arta fakultato, kaj kvankam lia ekzameno fariĝis sub speciala inspektorado, lia verko matematika rezultis tiel bonega ke la ekzamenintoj suspektis ke la skribisto estis helpinta lin. Tial ili devigis lin suferi novan, altvoĉan ekzamenon, en kiu li sukcesis tiel, ke oni ne volis ripeti la pruvon. Ne estas facile ke studento havante ordinaran okulvidon imagu la malhelpaĵojn, kiujn S-ro Mac William devis venki. Ekzemple, por la matematika kurso, ĉar li neniam vidis la diagramojn de la Eŭklidaj propozicioj li estis devigata venigi de Anglujo diagramojn reliefe stampitajn, kaj dum unu plena jaro li studadis per la



helpo de tiuj rimedoj. Sed la vespero mem antaŭ la ekzameno oni sciigis al li ke estis neeble utiligi tiujn aparatojn.

Nu, li neniel povis riski malsukceson en la matematika ekzameno, kaj dum la tuta nokto li pripensadis la aferon. Matene li proponis al la ekzamenantoj ke ili permesu al li utiligi ŝtalan ringon, kiu figurus rondon kun iom da fadeno por la rektaj linioj kaj kuprafadeno por la anguloj. La juĝantaro akceptis tiujn ilojn provizorajn, kaj per ilia helpo Mac-William sukcesis havi po 88 el ĉiu cento da markoj. Li ne havis sufiĉan monon por aĉeti Latinajn tekstlibrojn Braille-e prezitajn—tio estas la presado reliefa kiun uzas la blinduloj—tial ke li estis devigata aranĝi ke oni legu ilin al li dum li tradukis la tekstojn laŭ la Braille-a sistemo. Je la fino de ĉio li ricevis sian diplomon kun honoroj. Malgraŭ multaj kontraŭaĵoj li decidis fariĝi advokato, kaj nun li nur atendas ke la korporacio nomu lin en la venonta leĝa kurso. Ni kredas ke li estas la unua en la tuta Imperio kiu, spite tiom da malfacilaĵoj, eniris la leĝan profesion. Lia sukceso estas glora atesto pri lia kuraĝo kaj persisteco.

(El «The Press», Christchurch N. Z.)

*Tradukis N. MACLEAN.*

## Kuriozaĵoj por la cigarfumantoj

«Diversaj estas la metodoj uzitaj ĝis nun kaj celantaj koni la karakteron kaj pasiojn de la homoj per la eksteraj signoj; tiaj estas la frenologio, la fizionomiaj studaĵoj, la grafologio k. t. p. kiuj pretendas trafi la saman celon.

Ni tute ne scias, kiu elpensis alian procedon, kiu sin apogas sur la tenado del cigaro kaj sur la fummaniero de la persono, kies karakteron oni deziras elserĉi. La rezultatoj de la obsevaĵoj efektivigitaj estas la jenaj, laŭ ĵurnalo de kiu ni tion-ĉi detranĉas: «Tiu, kiu fumas la cigaron de unu ekstremu ĝis la alia, estas avarulo, egoisto.—El dek cigarfumantoj, naŭ estas avaraj.—Kiu fumas rapide demetante neniam la cigaron de la buŝo, estas ekkolerema, jaluza, karakterfirma kaj procesema.—Kiu skuadas ofte la cindrojn de la cigaro, estas subakvigata en gravaj pensoj aŭ en profundaj moralaj doloroj.—Kiu ludas je la cigaro ĝis kiam li bruligas siajn fingrojn kaj kiu bruldifektas al si la lipojn pro distro, estas aŭ poeto aŭ ĵurnalisto. El dek cigarfumantoj, du estas poetoj kaj ok ĵurnalistoj.—Kiu portas delikate la cigaron per la montra kaj longa fingroj, estas mensagemulo.—Kiu enspiras multe da fumo estas sana homo kaj, kontraŭe, kiu faras malgrandajn enspiradojn, estas malenergiulo.—Kiu fumas kiam sinjorinoj alestas, estas leginta nenian lernolibron pri ĝentileco.—La virino kiu fumadas, (estu viglaj! edzoj!) volas atingi la virajn rajtojn.—Kiu fumadas ĉe la Parlamento meritas esti forpelata.—Kiu fumas dum parolado aŭ parolas dum fumado estas... tute pura fumo».

Kiu elpensis tion supre diritan? Mi opinias «ke ne estis leono la desegnisto», ĉu ne vere? Nek mi ankaŭ, mi diras, sed mi amas ke iu ajn faru kion li volos, farante tion, kio estas permesita kaj zorge penante nenian difekti laŭ la diraĵo de Cicerono.

*Esperantigis: JOHANO GARCÍA MARTÍN SĜ.*

*Esp. 10.614*

## La bonfarinta ĝardenisto

(El Schmid)

Maljuna kaj honesta ĝardenisto faris multe da bono al la malriĉuloj. Li disdonacis al la malfeliĉuloj, kelke da malgrandaj monsumoj, kiujn li estus povinta uzi por havigi al si kelkajn plezurojn. Tiam, li diris: «tio ĉi estas pomo ĵetita trans la ĉirkaŭilon.» Demandite pri la senco de tiuj ĉi vortoj, «Unufoje—diris li—mi alvokis al mia ĝardeno kelkajn infanojn kaj permesis al ili manĝi la fruktojn, kiuj sin trovis sur la arboj, sed malpermesante ke ili enmetu ilin en siajn poŝojn».

«Unu el infanoj ĵetis multajn fruktojn trans la ĉirkaŭilon por retrovi ilin, elirante el la ĝardeno. Tiu ĉi artifaĵo donis al mi instruatan lecionon. Mi diris al mi mem: tio, kio okazis al tiuj ĉi infanoj ĉe mia ĝardeno, ankaŭ okazas tre ofte al la homoj ĉe la tero. Ni ĝuas la mondajn bonojn alportante nenion kun ni, sed ĉion, kion ni donacas al la matriĉuloj, ni ĵetas trans la ĝardenan ĉirkaŭilon por ĝin retrovi ĉe la Eterneco.

*Esperantigis FRANCISCO DOMINGO.*

---

## Miksaĵoj

Du grandaj mensoguloj interparolas en kafejo.

Iu, kiu plene ilin konas, diras al apudestanta sinjoro:

—Miru, sinjoro; ili estas tiel mensogemaj ke por trompi sin reciproke, ili estas kapablaj diri la veron.

JAKOBO GARCÍA, *tradukis.*

\* \* \*

En amika vespera interkunveno fraŭlino laŭte legas versaĵon titolitan: «*Se mi estas birdo*», terure longan kaj enuigan.

Ĉeestanto, kiu ne ĉesas oscedi dum legado de la kvazaŭ senfina poezio, ekkrias subite en kolera humoro: «*Se mi havus pafilon!*»

\* \* \*

En oficejo oni disputas malĝentile kaj laŭtege eĉ neatentante, ke la estro sidas en apuda ĉambro. En disputa flamenco, oficisto alparolas:

—Vi estas sentaŭgulo.

Kaj vi...? ekrespondas la alia.

—Ĉu povas ekzisti en la mondo viro pli malsaĝa ol vi, idiotulo?

La oficejestro el interne:

—Sinjoroj: ĉu vi forgesis ke mi staras tie ĉi?

V. INGLADA, *tradukis.*



## Korespondada fako de "La Suno Hispana,,

### SINJOROJ:

E. C., Sigüenza.—R. T. V., Marikuppam, Angla Hindujo.—A. B. Manitra.—G. N., Málaga.—H. F. S., London.—M. S., Valencio.—P. T., Madrid.

Mi ricevis viajn abonpagojn. Dankon.

Kore salutas Vin,

A. Ĵ. L.

---

### NIAJ VIZITANTOJ

- N.º 35.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, *Lima* (Peruo). Jarabono, 3 fr.
- N.º 29.—**Espero Katolika.** A Sainte Radegonde près *Tours* (*Indre et-Loire* Francujo). Jarabono, Francujo, 4 fr.; alilando, 5 fr.
- N.º 11.—**Espero Pacifista.** 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (Francujo), Jarabono, 5 fr.
- N.º 3.—**Esperantisten.** 37, Surbrunnsgatan. *Stockholm* (Svedujo), Jarabono, 3'50 frankoj.
- N.º 10, 11 kaj 12.—**El Mundo Ilustrado.** Aguila, 60, *Habana*. Numero 10 ctoj, 1, 2 kaj 3.
- N.º 1 al 12.—**Esperanto.** Papnovelde-Uteza, 6, Budapest IV, (Hungarujo) Jarabono, 3 frankoj.
- N.º 7.—**Germana Esperantisto.** Prinzentrasse, 95, *Berlin* S. (Germanujo). Jarabono 3 markoj.
- N.º 2.—**Idealo.** Corso Calatafini, 495, Palermo, *Italujo*. Jarabono, 3 fr.
- N.º 3.—**Internacia Revuo Medicina.** 33, rue Lacépède. *Paris*. Jarabono, 12 fr.
- N.º 4.—**Juna Esperantista.** 9, Avenue des Vollandes, *Genève* (Svisujo). Jarabono, 2 fr. 50.
- N.º 10 II jaro.—**La Algieria Stelo.** 57, rue d'Isly, *Algér* (Alĝerujo). Jarabono, 3 fr.
- N.º 47.—**La Belga Sonorilo.** S-ro J. Coox, *Duffel*, (Belgujo). Jarabono, 4 fr.
- N.º 121.—**La Revue de l'Esperanto,** 26, rue Wissoq, *Boulogne-sur-Mer* (Francujo). Prezo, 0'10 fr. ekzemplero.
- N.º 7, 8.—**La Esperanta Studento.** 16. Upper Westbourne Villas, Hove, Sussex-England. Jarabono, 2 fr.

N.º 142.—**Lingvo Internacia.** 33, rue Lapepède. *Paris*. Jarabono, 5 fr. Kun literatura aldono 7 fr. 50.

N.º 128, 129, 130.—**Murcia.** Sociedad, 14, Murcia. Jarabono, 6 pesetoj.

N.º 146, 147.—**Museo Exposición.** Medina, 37, *Alicante*. Jarabono, 5 pesetoj.

N.º 6.—**Revista de Menorca.** Ateneo científico. *Mahón*. Jarabono, 6 fr.

N.º 5.—**Ruslanda Esperantisto.** S. Petersburgo, Bolš. Podjačeskaja, 24 (Rusujo).  
Unu numero 30 kopekojn.

N.º 6.—**Svisa Espero.** 6, vieux College, *Genève* (Svisujo) Jarabono, 2,50 frankoj

N.º 19.—**The British Esperantist.** unuigita kun **The Esperantist.** 13, Arunde street, Strand. W. Q. *Londono*. Jarabono, 2 fr. Kun aldono literatura, 4 frankoj.

N.º 12.—**Tra la Mondo.** 15, Boulevard des deux Gares, *Mendon* (S. et O.) (Franujo) Jarabono, 8 fr.

N.º 7.—**Unua Paŝo.** San Stefano, 26, Sofia, (Bulgarujo). Jarabono, 3 fr.

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

## ANONCOJ

# LA REVUO

INTERNACIA MONATA LITERATURA GAZETO

kun la konstanta kunlaborado

\* \* \* DE DOKTORO L. L. ZAMENHOF \* \* \*

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estos pure literatura, ĝi enhavos: novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, seriozajn studiojn pri historio, geografio, statistiko, popolmorojn, k. c., kronikon tre mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografio.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povas naski disputojn estos malakceptata de la Redakcio.

D-ro L. L. Zamenhof *sola* povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

La 1<sup>a</sup> numero aperos la 1<sup>an</sup> de Septembro 1906 okaze de la 2<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto.

KOSTO: ĉiu numero. . . . . 0 fr. 50

jara abono. . . . . 6 fr. »

En Hispanujo, oni povas jam de nun aboni ĉe:

La firmo *J. Espasa, 579, calle de las Cortés, Barcelona.*